A K T U A L E

Monata informilo de Sovetia Esperantista Junulara Movado

N°5(32) Majo-junio 1976

## RENKONTE AL LA JUBILEA KONFERENCO

Finiĝas la vica SEJM-agadjaro, kiun ni konsideras jubilea. Dek jaroj pasis, post kiam grupo de kuraĝaj aktivuloj komencis arigi ĉirkaŭ si la junajn E-fortojn, premisante per tio vastan, kvalifikitan kaj - plej grave - koordinitan laboron en tutlanda skalo. Hodiaŭ SEJM estas aŭtoritata kolektivo, kies interesojn konsideras tiel la plej estimataj E-istoj de la pli aĝa generacio en Sovetio, kiel la naciaj kaj internaciaj E-organizaĵoj eksterlande.

La statistikaj rezultoj de la jubilea jaro ankoraŭ ne estas finkalkulitaj. Tamen ne devas esti duboj, ke la plej multo de niaj kluboj kaj aktivuloj agis inde kaj konscie, strebante ĉiupaŝe progresigi la komunan aferon kaj ne timante malfacilaĵojn kaj obstaklojn, kiuj ja aperas senkonsidere, ĉu por ni la jaro estas jubilea aŭ ne... Inter la atentindaj trajtoj de la jaro mi dezirus rimarkigi la jenajn. Kreiĝis kelkaj fakaj laborgrupoj - necesa kondiĉo por plivigliĝo de la faka agado. Precipe laŭdinde agas la Scienc-Teknika fako sub la kompetenta gvido de A.Gonĉarov: ĝi jam regule eldonas proprajn paĝojn enkadre de "Aktuale". Nia informilo ĝenerale iĝis pli serioz-enhava kaj samtempe pli legata: proksimume duoble kreskis la kvanto de niaj subtenantoj. La reprezentanto de SEJM ĉe UEA B.Kolker estas konfirmita kiel ĉefdelegito, do de nun la UEA-delegitan reton en nia lando prizorgos SEJM.

Resumi la agadon de SEJM dum la lasta jaro kaj ĝenerale dum la jardeko - jen estas unu el la esencaj taskoj de nia jubilea IO-a Konferenco de la SEJM-Konsilantaro. Kiel ĝian ĉeftemon la Komitato difinis "SEJM hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ". Ni devos detale analizi niajn atingojn kaj preterlasojn, plani la plej gravajn agaddirektojn por estonto. La kluboj konatiĝu kun la aldonata ĉi-sube proksimuma plano de la Konferenco, preparu elpaŝojn por la tagaj debatoj kaj vesperaj disputoj. La ĝeneralaj klubraportoj estu lakonaj (ne pli ol 3-5 min.), sed afêrecaj kaj prezentu la plej gravajn momentojn, per kiuj distingiĝis la agado de la klubo en la jubilea jaro. Krome, la kluboj pripensu, kiujn el siaj aktivuloj ili povus rekomendi por respondeca laboro en SEJM-skalo (Komitato, fakgvidado).

Signifa ero de la Konferenco estas akcepto de la nova SEJM-Regularo. En ĝia projekto, kiu estas sur la paĝoj 65-69 respeguliĝis la tuta sperto de gvida kaj organiza laboro, kiun akumulis SEJM dum sia unua jardeko. La aktivuloj atente trastudu la projekton, preparu rimarkojn kaj proponojn, por ke la nova Regularo ĉiuflanke respondu al la organiza nivelo, kiun ni atingis.

Dum la Konferenco estos analizataj niaj leterkontaktoj kun la oficialaj instancoj. Ĉi tie estas konvene rememorigi, ke ĉiujn ricevitajn respondojn oni nepre prezentu al la Konferenco. La Komitato konsideros tion, poentigante partoprenon en la kampanjo. (Partopreno en la kampanjo "Instancoj" estas taksata jene: ĉiu respondita de oficiala instanco letero alportas: por privata letero - 2 poentojn, por oficiala kluba - 4 poentojn.)

Verŝajne jam venis la tempo por tio, ke en siaj Konferencoj la SEJM-Konsilantaro planu laboron ne nur por jaro antaŭen, sed ankaŭ pli perspektive. Ekzemple estus utile jam anticipe prepariĝi al diver-

saj gravaj eventoj kaj datrevenoj, plani aktivecojn lige kun ili. Jam sekvajare ni devas inde renkonti la 60-jariĝon de la Granda Oktobro kaj la Tutsovetian Kongreson de Sindikatoj. En 1978 okazos la XVIII-a Kongreso de Komsomolo kaj la XI-a Mondfestivalo de junularo kaj studentoj en Havano, en 1980 - la XXII-aj Olimpikaj Ludoj en Moskvo. Estas atentindaj ankaŭ la esperantistaj jubileoj - la 90-jariĝo de nia lingvo en 1977 kaj la 25-jariĝo de la fama Montevidea Unesko-rezolucio en 1979. Do ni havas vastan kampon por proponi novajn iniciatojn.

La Komitato de SEJM esperas, ke ĉiu partoprenonto de la jubilea Konferenco venigos al ĝi ne nur kajeron por diligente noti alies sperton, sed ankaŭ proprajn ideojn, freŝajn proponojn. Nur tio povas garantii sukcesan laboron de la Konferenco, pluan antaŭenigon de SEJM-agado.

V.Aroloviĉ, prezidanto de SEJM.

PROKSIMUMA PLANO
de la jubilea 10-a Konferenco de la SEJM-Konsilantaro
(p r o j e k t o)

Alvena tago - 11.8
Registriĝo de la konferencanoj, enmanigo de mandatoj. Kunsido de la SEJM-Komitato. Malfermo de la Konferenco, organiza kunveno.

Unua tago - 12.8
Matene kaj posttagmezeà: Ĝeneralaj raportoj de SEJM-kluboj (SEJM-reprezentantoj aŭ klubestroj). Raportoj de nealiĝintaj grupoj, eventuala kandidatiĝo al SEJM.
Vespere: Disputo "Kion donas SEJM al la kluboj, kion faras la kluboj por progreso de SEJM?"

Dua tago - 13.8
Matene: SEJM hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ (ĝenerala pridiskuto).
Posttagmeze: Faka agado en SEJM (N.Cvileneva, fakestroj).
Vespere: Disputo "Kio malhelpas al operativa informado en SEJM?"

Tria tago - 14.8
Matene: Regionaj, someraj kaj aliaj renkontiĝoj en SEJM. Preparo kaj programo de SEJT-18 (M.Bronŝtejn).
Posttagmeze: Financa stato de SEJM (A.Melnikov). Interna informado en SEJM (V.Ebel).
Vespere: Disputo "Kiel plifacilig eksterlandajn vojaĝojn?"

Kvara tago - 15.8
Matene: Eksterlandaj rilatoj de SEJM (D.Cibulevskij, B.Kolker). La kampanjo "Instancoj" (V.Aroloviĉ).
Posttagmeze: Pridiskuto kaj akcepto de nova SEJM-Regularo.
Vespere: Disputo "Ĉu necesas akceli oficialan agnoskon de SEJM?"

Kvina tago - 16.8
Matene: Sekretariaj aferoj. Rezultoj de la socialisma konkurado (P.Jegorovas). SEJM-subtenantoj kaj laboro kun nealiĝintaj. Konkluda raporto pri la laboro de la SEJM-Komitato (V.Aroloviĉ).
Posttagmeze: Reelektoj en la SEJM-Komitaton kaj reelekto de fakestroj. Akcepto de Decidoj. Fermo de la Konferenco.
Vespere: Libertema disputo.

Postkonferenca kunveno en SEJT-18
Resumo pri la Konferenco kaj ĝiaj Decidoj. Raportoj de novvenintaj grupoj, eventuala kandidatiĝo al SEJM. Rezultoj de la Paroliga Periodo. Decidoj pri sekvaj SEJT-oj.

Kompilis V.Aroloviĉ, prezidanto de SEJM.

## HONORAJ AKTIVULOJ DE SEJM

Jen finiĝis la elektoj de la kategorio "Honora aktivulo de SEJM". La aranĝo estis organizita lige kun la IO-jara jubileo de SEJM, de nia movado. Nun mi elmetu la rezultojn de la elektoj kaj honorigu la elektitojn. El 67 proponrajtaj personoj sian rajton efektivigis I4 esperantistoj. Entute oni proponis 24 aktivulojn por elekto. Tamen 9 el ili ne trafis la liston de la kandidatoj pro nesufiĉa kvanto da proponintoj (minimume 3 devis esti) aŭ pro nekonformo de la proponitoj al la anticipe anoncitaj 3 kondiĉoj (vd. "A"-9(24), pp.II8-II9). Do estis registritaj I5 kandidatoj por la kategorio. Laŭ decido de la SEJM-Komitato oni devis elekti IO Honorajn aktivulojn de SEJM.
Ĉiukandidato ricevis balotenketon, kiun pleniginte resendis al mi. El ĝi ni povas vidi la meritojn de ili en la E-movado, konkrete en SEJM.

La voĉdonilo kun listo de kandidatoj estis dissendita al ĉiuj 67 voĉdonrajtaj personoj (komitatanoj, fakestroj, servoestroj, funkciuloj, reprezentantoj de la kluboj). Voĉdonis, t.e. resendis la voĉdonilojn, 47 voĉdonrajtaj personoj. 20 pro nekonataj kaŭzoj sian devon ne plenumis. Ĉiuj ricevitaj 47 voĉdoniloj estas agnoskitaj kiel validaj. La plej grandan nombron da voĉoj gajnis kaj estas elektitaj al la kategorio "Honoraj aktivuloj de SEJM" jenaj kamaradoj:

I. Aroloviĉ V.S. (Moskvo)
2. Bronŝtejn M.C. (Tiĥvin)
3. Cibulevskij D,M. (Ĥarkov)
4. Gonĉarov A.E. (Barnaul)
5. Kolker B.G. (Ufa)
6. Medinŝ A.V. (Riga)
7. Podkaminer S.N. (Leningrad)
8. Ŝamodaj V.V. (Moskvo)
9. Ŝilas V.P. (Vilnius)
IO. Vizgirdas A.P.P. (Klaipeda)

Gratulojn al ili! Tiuj ĉi esperantistoj estu ekzemplo al ĉiu el ni. Dank' al ilia persista, obstina, multjara , konstanta aktiva agado SEJM elkreskis, fortiĝis, fariĝis memstara junulara fenomeno, granda forto. N i bondeziru al ili ankoraŭ longe aktivi en SEJM, atingi grandajn sukcesojn kaj rezultojn.
Neelĉerpeblan energion!

P.Jegorovas, v/p de SEJM pri sekretariaj aferoj.

## LA UNUA PERIODO, - KIEL NI RAPORTIS?

La sekretariajn poentopremiojn gajnis la kluboj de Viljandi, Kapsukas, Tiĥvin. (20, I5, IO poentojn respektive.) Jen la plej disciplinemaj! Ĝis la limdato (la 3I-a de januaro) min atingis nur I6 raportoj. En februaro venis ankoraŭ I2 raportoj el Moskvo, Doneck,Salavat, Meĵdureĉensk, Novosibirsk, Soĉi, Krasnojarsk, Ĥmelnickij, Kaŭnas, Zaporoĵje, Klaipeda, Rostov-Don. 5 raportoj venis en marto : Sizranj, Liepaja, Birsk, Talgar, Ust Kamenogorsk. Sekvis 3 raportoj dum aprilo: Kedainiai, Ĉelabinsk, Ivanovo. Finfine la I4-an de maje mi ricevis ankoraŭ raporton el Omsk. De 6 kluboj raportoj pri la unua periodo tute ne venis, malgraŭ ke mi trifoje memorigis pri tio kaj peti- tamen sendi. Do la bildo estas ne tre impresa. Denove demando pri la disciplino.

La detalajn ciferajn rezultojn mi publikigos post la dua periodo. Nun eblas diri, ke ĝenerale la kluboj fariĝas pli kaj pli aktivaj kaj realigas pli multe da aktivecoj, pertaborante pli multajn poentojn. La 6 neraportintaj kluboj estas en la fino de la vicordo. La stato malbonas ĉe Taŝkent kaj Tallinn, kiuj estante kandidatoj ne deziras plenumi siajn devojn. Ankaŭ Tula, Siktivkar, Maĥaĉkala kutime estas nedisciplinemaj.

## REZULTOJ DE LA SOCIALISMA KONKURADO INTER LA KLUBOJ DE SEJM
(la unua periodo 1975/76: loko, poentoj)

I.Poltava..................202I
2. Ufa.....................I4I0
3.Riga.....................II86
4.Klaipeda.................I094
5.Vilnius, "Juneco".........940
6.Krasnojarsk...............734
7.Ust-Kamenogorsk, "Verda Horizonto"...............6I9
8.Leningrad.................558
9.Ĥarkov, "Optimisto".......488
I0.Miass, "Malaĥita Stelo"..485
II.Ivanovo..................470
I2.Rostov-Don,"Amikeco".....443
I3.Doneck...................437
I4.Tjumenj, "Revo"..........4I4
I5.Ĥmelnickij...............406
I6.Viljandi.................352
I7.Kaunas...................305
I8.Tiĥvin, "Lampiro"........30I
I9.Moskvo...................280
20.Salavat "Verda Aŭroro"...267
2I.Sizranj, "Espero"........245
22.Kujbiŝev.................243
23.Meĵdureĉensk.............222
24.Novosibirsk..............2I9
25.Ĉelabinsk................206
26.Omsk, "Kamomilo".........I97
27.Kiev, "Ora Purdego"......I76
28.Talgar, "Verda Brigantino" I68
29.Liepaja, "Tilieto".......I65
30.Soĉi.....................I57
3I.Kapsukas, "Suduva".......I3I
32.Sterlitamak, "Esperartisto" II4
33.Zaporoĵje.................90
34.N ovomoskovsk..............86
35.Kedainiai, "Verda Kverko"..59
36.Velikie Luki,"Stelo".......40
37.Birsk......................22
38. Barnaul, "Oazo"............0
39.Maĥaĉkala, "Guto"...........0
40.Siktivkar, "Norda Stelo"....0
4I.Tallinn, "Hirundo"..........0
42.Taŝkent.....................0
43.Tula, "Solidareco"..........0

Nun kelkajn vortojn pri la kvalito de la raportoj. La ĝenerala bildo estas bona. Tamen ĝis nun ne malofte eblas trovi diversspecajn erarojn.

Unue, necesas tre akurate trastudi la Taksan Demandaron kaj atenti ĉiun ties vorton, ciferon k.a. Multaj kluboj ne atentas la rimarkojn, kiuj estas fine de la Taksa Demandaro. Sed ili estas tre gravaj. Sen mencio de tiuj donitaĵoj, kiuj estas notitaj en la rimarkoj, la aktivecoj kun la poentoj estas forstrekataj. Kelkaj erare interpretas apartajn punktojn de la Taksa Demandaro. Ekzemplo de la raportado ankaŭ estas donita fine de la Taksa Demandaro en Sekretaria Libro. Tamen ankaŭ ĉi tie oni trovas arbitrajn notojn. Do strikte atentu la kondiĉojn n la punktoj de la Taksa Demandaro, precize identigu aktivecon kun la punkto de la Taksa Demandaro, atentu la rimarkon pri la amplekso de raporto, I0 rimarkojn (piednotojn), kiuj ĉe la punktoj de la demandaro estqs signitaj per la ciferoj, rimarkon pri dato de forsendo de la raportoj, pri punado per forpreno de poentoj pro malfrua raportado, ekzemplo de la raportado k.a. Raporto estu laŭĉapitra kiel la Taksa Demandaro. Per la 47 punkto oni raportu pri vere unuikaj aktivecoj kaj tre gravaj, sed ne pei ĉiu bagatelo. Se vi nepre deziras registri ĉiujn aktivecojn (bona intenco), do enskribu ilin en la ĉapitron "Nepoentigataj aktiveco", sed ne en la punkton 47 aŭ iun alian.

La Taksa Demandaro povas helpi en planado de la kluba laboro. Kelkaj kluboj mencias la saman aktivecon en kelkaj punktoj kiel apartan. La raporto estas bonega historia dokumento. Do estu ĝi akurata, preciza, klara ĝustatempa. Kopio de la raporto restu en la kluba dokumentaro. La raporton oni verku dum la tuta agadjaro, ĉiujn aktivecojn zorgeme kaj pedante registru en speciala kajero. Tiam ne estos problemo verki la raporton rapide kaj ĝustatempe.

Nun kelkajn pensojn pei la direktoj de la agado, kiujn laŭ miaimago necesus pliaktivigi. N ecesas pli ofte pli detale informadi eksterlandajn esperantistojn pri la agado de SEJM pere de eksterlandaj periodaĵoj, radio. Ne malhelpus pli longaj artikoloj, ankaŭ problemaj. Ni malofte veturas eksterlanden kaj malofte partoprenas internaciajn kaj naciajn E-aranĝojn. "Heroldo de E-o" ĉiujare publikigas kaj la Pola E-Asocio eldonas per aparta broŝureto kalendaron de E-aranĝoj tutmonde.

(Daŭrigo en la paĝo 69).

# REGULARO DE SOVETIA ESPERANTISTA JUNULARA MOVADO (SEJM)
(projekto)

## I. SEJM, ĜIAJ CELOJ KAJ ĈEFAJ TASKOJ

I. SEJM estas formo de kunagado inter junularaj E-kluboj (grupoj), komunaj E-kluboj kaj aŭ iliaj junularaj sekcioj.

2. La celoj de SEJM estas disvastigo, diskonigo kaj praktika utiligo de Esperanto por propagandi la sovetan ideologion kaj kulturojn de sovetaj popoloj eksterlande surbaze de la proleta internaciismo kaj paca kunekzistado samkiel ekkono de la vivo kaj kulturo en eksterlando pere de Esperanto.

3. Al la celoj SEJM strebas kunlaborante kun partiaj, komsomolaj, sindikataj, ŝtataj kaj sociaj institucioj.

4. La ĉefa tasko de SEJM estas: organizi sovetian esperantistan junularon por atingi la celojn per plej diversaj jure permesitaj rimedoj kaj metodoj.

5. SEJM manifestiĝas per kunagado de siaj kluboj (grupoj, sekcioj). SEJM akceptas subtenon kaj kunlaboron de nealiĝintaj E-kluboj (grupoj) kaj de individuaj esperantistoj.

6. SEJM kunlaboras kun naciaj kaj internaciaj E-organizaĵoj surbaze de la celoj.

7. Ĉiuj oficoj en SEJM daŭras unu agadjaron.

8. La oficiala kaj labora lingvo de SEJM estas la internacia lingvo Esperanto. Kiel escepto povas esti uzata nacia lingvo por kontaktoj kun neesperantistaj organizaĵoj kaj individuoj.

9. SEJM ĉiujare organizas Sovetiajn Esperantistajn Junularajn Tendarojn (SEJT).

## II. SEJM-KONSILANTARO, KONFERENCOJ DE LA SEJM-KONSILANTARO

I. SEJM reprezentiĝas per Konsilantaro, kiun eniras: a)reprezentantoj de la kluboj (grupoj, sekcioj), b)komitatanoj de SEJM, c)prezidantoj de regionaj komitatoj, d)fakestroj kaj servoestroj, e)eventualaj reprezentantoj de SEJM ĉe TEJO kaj UEA.

2. Konferenco de la Konsilantaro estas supera organo de SEJM, forumo de SEJM.

3. Konferencoj de la Konsilantaro okazas unufoje en jaro.

4. La Konsilantaro dum Konferenco aŭ perletere voĉdonante faras decidojn de SEJM-graveco.

5. Konsilantaro:

   a)akceptas kaj ŝanĝas Regularon;
   b)akceptas raportojn de la Komitato;
   c)konfirmas perspektivan kaj agadjaran laborplanon de SEJM;
   ĉ)elektas Komitaton, fakestrojn, servoestrojn, revizoron, reprezentantojn ĉe TEJO kaj UEA;
   d)fiksas la ĝeneralajn agaddirektojn;
   e)organizas kaj efektivigas interŝanĝon de agadsperto;
   f)fiksas membro- kaj subtenkotizojn;
   g)pridiskutas movadajn problemojn.

## III. SEJM-KOMITATO

I. Por solvo de aktualaj demandoj estas elektata Komitato (prezidanto kaj vicprezidanto).

2. Komitato estas la centra plenuma organo de SEJM.

3. Novelektita Komitato de SEJM ekfunkcias ekde la I-a de septembro de la koncerna jaro.

4. Estas rekomendataj jenaj kondiĉoj ĉe elekto de SEJM-Komitato:
   a)por prezidanto - minimume jara komitataneco;
   b)por vicprezidantoj - minimume jara membreco en la Konsilantaro.
5. La Komitato:
   a)regule kunsidas (3-4 fojojn jare);
   b) regule cirkuleras inter si;
   c)planas la laboron de SEJM;
   ĉ)gvidas, koordinas la laboron de la kluboj (grupoj, sekcioj), fakoj, servoj;
   d)realigas decidojn de la Konsilantaro, kontrolas ties plenumon;
   e)reprezentas SEJM-on ĉe oficialaj instancoj kaj eksterlande;
   f)preparas tagordon de SEJM-Konferenco;
   g)direktas la agadon, rekomendas aktualajn akcivecojn, organizas kampanjojn;
   h)organizas SEJT-ojn;
   i)aprobas la buĝetoplanon de SEJM, direktas financa-mastruman agadon de SEJM;
   j)rekomendas delegatojn al eksterlandaj vojaĝoj;
   k)organizas socialisman konkuradon inter kluboj (grupoj,sekcioj);
   l)solvas aliajn aktualajn demandojn de SEJM-graveco.
6. La Komitato raportas pri la dumjara laboro al la Konferenco, sur paĝoj de "Aktuale", en SEJT.

## IV. SEJM-KLUBOJ. SEJM-REPREZENTANTOJ KAJ ILIAJ DEVOJ

1. Esperanto-kluboj (grupoj, sekcioj) estas kolektivaj membroj de SEJM. Membreco en SEJM estas nur kolektiva.
2. Nova klubo(grupo, sekcio) devas trapasi kandidatan periodon.kaj estas aligata al SEJM per decido de SEJM-Konferenco laŭ la rezultoj de la socialisma konkurado (escepte dum regionaj renkontiĝoj, kiujn partoprenas reprezentantoj de minimume tri SEJM-kluboj (grupoj, sekcioj)).
3. La kandidatiĝon registras la Sekretario de la Konsilantaro post koncernaj raportoj de klubo-aliĝanto kaj klubo-rekomendanto kaj post koncerna decido.
4. Kandidatiĝinta klubo en daŭro de 2 monatoj okazigas elekton de SEJM-reprezentanto por la kunlaboro. La reprezentanto aŭtomate eniras la Konsilantaron.
5. SEJM-kluboj (grupoj, sekcioj) aktive agas en sia regiono de aktiveco, pri sia laboro dufoje jare sendas skriban raporton al la Sekretario de la Konsilantaro laŭ la Taksa Demandaro, regule pagas kotizon por la SEJM-fonduso, regule sendas materialon al "Aktuale" kaj aliaj internaj informiloj de SEJM.
6. SEJM-reprezentanto devas:
   a)reprezenti interesojn de SEJM en koncerna klubo (grupo, sekcio);
   b)organizi raportadon, regulan pagadon de la kotizo, sendadon de materialoj al la SEJM-informiloj;
   c)organizi plenumon de decidoj de la Konferenco kaj de la Komitato;
   ĉ)organizi kunlaboron de la klubo kun fakoj kaj servoj de SEJM;
   d)respondeci pri aktiva agado de la klubo en sia regiono de aktiveco;
   e)laŭeble veni al la SEJM-Konferenco;
   f)raporti pri la agado de la klubo dum Konferenco, SEJT, al la Komitato.
7. SEJM-reprezentanto eniras la estraron de klubo (grupo, sekcio).
8. Aliĝintaj kaj kandidataj kluboj havas la samajn rajtojn kaj devojn.
9. E-kluboj (grupoj, sekcioj), neglektantaj ĉi tiun Regularon kaj precipe la regulon IV.5 estas anoncataj "esti ekster SEJM" kaj ĉesas ricevadi informilojn.

V. FAKOJ KAJ SERVOJ

I. En SEJM funkcias diversaj fakoj kaj servoj, ekzemple:bibliografia, historia, informa, kanta, kolektanta, koresponda, lerneja, lumbilda, magnetofona, metodika, naturamika, poezia, radioamatora, scienc-teknika, scienc-esplora, traduka, La fakoj kaj servoj ekfunkcias kaj estas likvidataj laŭbezone dum SEJM-Konferenco.
2. Fakojn kaj servojn gvidas fakestroj kaj servoestroj, elektataj el aktivuloj de SEJM aŭ el subtenantoj de SEJM dum SEJM-Konferenco.
3. La elektitaj fakestroj kaj servoestroj formas per varbado laborgrupojn el membroj de SEJM-kluboj (grupoj, sekcioj), el subtenantoj kaj aliaj esperantistoj.
4. La taskojn de konkreta fako aŭ servo fiksas SEJM-Konferenco aŭ la SEJM-Komitato.
5. Fakestroj kaj servoestroj raportas pri sia laboro al SEJM-Konferenco, SEJM-Komitato, sur paĝoj de "Aktuale", dum SEJT-oj.
6. Senperan gvidon de la fakoj efektivigas la vicprezidanto de la SEJM-Komitato pri fakaj aferoj.

VI. REGIONA AGADO

I. SEJM havas jenajn historie kreiĝintajn regionajn de aktiveco: a)Ĉebaltian, b)Centro-Rusian, c)Ukrainian, ĉ)Kaŭkazian, d)Volgo-Uralan, e)Mezazian, f)Okcident-Siberian.
2. Por solvo de aktualaj demandoj de regiona graveco povas esti elektitaj regionaj komitatoj.
3. Regionaj komitatoj mobilizas fortojn de la kluboj (grupoj, sekcioj) por plenumi la decidojn de SEJM-Konferenco kaj de la SEJM-Komitato, organizas regionajn E-renkontiĝojn, regionajn konferencojn, zorgas pri ĉiuj aliaj movadaj regionaj demandoj.
4. Regionajn komitatojn gvidas la SEJM-Komitato.
5. Regionaj komitatoj raportas pri la laboro al SEJM-Konferenco, SEJM-Komitato, dum SEJT, sur paĝoj de "Aktuale".

VII. INFORMADO EN SEJM

I. La centra informilo de SEJM estas bulteno "Aktuale", kiu estas dissendata al ĉiuj aliĝintaj kaj kandidataj kluboj (grupoj, sekcioj), komitatanoj, individuaj kaj kolektivaj subtenantoj.
2. La redaktoro de "Aktuale"estas membro de la SEJM-Komitato.
3. Kiel aldona materialo al "A" estas regule eldonata nacilingva kolekto de novaĵoj "Laŭ meridianoj de Esperanto".
4. Fakoj kaj servoj rajtas havi apartajn informilojn, same regionoj de aktiveco.
5. SEJM subtenas la literaturan almanakon "Amikeco" kaj kunlaboras kun ĝi.
6. Por urĝa informado ĉiu struktura unuo de SEJM rajtas eldoni kaj dissendi neregulan porfojan informilon.
7. Al la aliĝintaj kaj kandidataj kluboj estas dissendata "Informa kolekto de SEJM".
8. Ĉiu aliĝinta kaj kandidata klubo (grupo, sekcio) ĉiuagadjare ricevas "Sekretarian Libron". Ĝin ricevas ankaŭ komitatanoj, individuaj kaj kolektivaj subtenantoj, fakestroj kaj servoestroj, revizoro, reprezentantoj ĉe UEA kaj TEJO.
9. Laŭ decido de la SEJM-Komitato kaj SEJM-Konferenco povas esti uzataj ankaŭ aliaj formoj de interna informado.
IO. La arkivo de SEJM estas ĉe la Sekretario de la Konsilantaro.

VIII. SOCIALISMA KONKURADO

I. Inter la aliĝintaj kaj kandidataj kluboj (grupoj, sekcioj) de SEJM estas efektivigata socialisma konkurado.
2. Taksan Demandaron fiksas, ŝanĝas, fiksas kriteriojn de la socialisma konkurado la SEJM-Komitato, konfirmas SEJM-Konferenco.

3. Subtenantoj de SEJM agas eksterkonkurse.
4. La SEJM-Komitato surbaze de la klubaj raportoj, raportoj de fakestroj kaj servoestroj ĉiujare fiksas vicordon de la kluboj laŭ aktiveco.
5. SEJM-Konferenco ĉiujare konfirmas la plej aktivajn klubojn (grupojn, sekciojn), kiuj ricevas valorajn premiojn. La plej bona klubo, krome, ricevas la transiran SEJM-Pokalon.
6. La klubo (grupo, sekcio) trifoje gajninta la SEJM-Pokalon ekhavas ĝin por eterne. La SEJM-Komitato tiuokaze fondas alian SEJM-Pokalon.
7. Socialisma konkurado okazas ankaŭ inter fakoj kaj servoj laŭ speciale kompilita kriteriaro.
8.

## IX. SUBTENANTOJ DE SEJM

1. Subtenantoj de SEJM estas individuaj esperantistoj, sendepende de la aĝo, kaj E-kluboj (grupoj, sekcioj) nealiĝintaj, kiuj subtenas SEJM-on finance kaj kontribuas la agadon de SEJM.
2. Subtenanteco estas akceptata por agadjaro kaj validas ~~por~~ dum la koncerna agadjaro.
3. Por fariĝi subtenanto de SEJM necesas pagi al la SEJM-Fonduso monsumon fiksitan de SEJM-Konferenco, malsama por kolektivaj kaj individuaj subtenantoj. Samtempe necesas informi la sekretarion de la Konsilantaro.
4. Subtenantoj ricevas ĉiujn informilojn de SEJM, alian gravan bazan materialon.
5. Subtenantoj povas aŭdigi sin pere de "Aktuale", povas uzi servojn, kunlabori en fakaj laborgrupoj, rajtas partopreni SEJT-ojn kaj SEJM-Konferencojn.
6. Subtenantoj pri sia agado informas la Komitaton, Konferencon, "Aktuale".
7. La sola devo de subtenantoj estas konsideri la Instrukcian Leteron, alsendatan al ĉiu subtenanto.

## X. HONORAJ AKTIVULOJ DE SEJM

1. Okaze de jubileoj de SEJM ĉiun 5-an jaron estas elektataj Honoraj Aktivuloj de SEJM.
2. La kvanton de elektotoj, la kondiĉojn de elektado fiksas la SEJM-Komitato.
3. Honoraj Aktivuloj de SEJM estas elektataj el la plej aktivaj sejmanoj, havantaj apartajn meritojn pro sia longdaŭra kaj aktiva agado en kadro de SEJM.
4. Honoraj Aktivuloj de SEJM rajtas:
   a) sen rekomendo veni al ĉiuj aranĝoj de SEJM, organizataj sub aŭspicio de SEJM;
   b) peti informojn ĉe la Komitato de SEJM, ĉe fakestroj, servoestroj;
   c) konsili al la SEJM-Komitato;
   ĉ) insisti pri pridiskuto de koncernaj demandoj en la SEJM-Komitato, en SEJM-Konferenco.
5. Listo de Honoraj Aktivuloj de SEJM estas publikigata en Sekretaria Libro.

## XI. ALIAJ DEMANDOJ

1. Fonduso de SEJM konsistas el:
   a) subtenmon sumoj kaj membrokotizoj de la kluboj (grupoj, sekcioj);
   b) enspezoj de SEJT;
   c) enspezoj de butikoj, loterioj k.a. aranĝoj;
   ĉ) mondonacoj, subvencioj kaj aliaj enspezoj.
2. La mono de la SEJM-fonduso estas uzata por:
   a) kovri elspezojn de informiloj;
   b) akiro de propagandiloj kaj lerniloj;
   c) eventuala eldono de E-materialo;
   ĉ) premiado de plej aktivaj kluboj (grupoj, sekcioj);

d)akiro de teknikaj rimedoj;
e)organizaj kaj teknikaj elspezoj;
f)diversaj aliaj eventualaj elspezoj (poŝtelspezoj,oficvojaĝoj k.a.).

3. Subtenaj monsumoj kaj klubaj membrokotizoj estas pagataj laŭ kontingentoj, fiksitaj de la SEJM-Komitato.
4. La buĝetan planon de SEJM ĉiujare kompilas la vicprezidanto de SEJM pri financaj aferoj kaj konfirmas la SEJM-Komitato.
5. Revizoro de SEJM, elektata dum la SEJM-Konferenco regule kontrolas la financa-mastruman agadon de SEJM.
6. SEJM-reprezentantoj ĉe TEJO kaj UEA reprezentas interesojn de SEJM ĉe tiuj organizaĵoj, peras kunlaboron. Ili raportas pri sia agado al la SEJM-Komitato kaj SEJM-Konferenco.
7. Fari ŝanĝojn en tiu ĉi Regularo rajtas nur Konferenco de la Konsilantaro.
8. SEJM estas likvidata per decido de SEJM-Konsilantaro per kvalifikita plimulto da voĉoj (2/3).

Laŭ komisio de la SEJM-Komitato kompilis
P.Jegorovas, v/p de SEJM pri sekretariaj aferoj.

Al legantoj

Mi prezentas por vi jenan projekton de la Regularo de SEJM por konatiĝo kaj analizo. Ĝin ni devas pridiskuti kaj akcepti dum la SEJM-Konferenco. Do kritike rigardu al ĉia ties punkto, strukturo ktp. kaj proponu viajn opiniojn por la Konferenco pri aldonoj, forstrekoj, ŝanĝo de la ĉapitroordo, ŝanĝo de formulado de apartaj paragrafoj ktp. Estas atendataj ankaŭ ŝanĝoj de redakta karaktero (lingva, stila k.s.).

P.Jegorovas, v/p pri sekretariaj aferoj.

---

(Daŭrigo el la paĝo 64 )

Ĉu multajn partoprenis sejmanoj? Lamas tia grava kampo de laboro: historio de la E-movado en nia lando de la plej fruaj jaroj ĝis nun.
Necesus aktivigi la agadon sur la scienca kampo. Tre utilus helpi laŭ niaj fortoj al la Problema grupo ĉe la instituto de lingvoscienco de Scienca Akademio de USSR. Ili serĉas kunlaborantojn en ĉiuj respublikoj.
Kvankam "A" jam elkreskis kaj publikigas sufiĉe da valora materialo, tamen la listo de aŭtoroj kreskas malrapide. Multaj kluboj ne donas scii pri si dum tuta jaro sur paĝoj de nia informilo. Do ĉiuj kluboj laŭforte almenaŭ per mallongaj informoj aŭdigu vin. Ĉu vi nenion havas por diri al ĉiuj? Ĉu vi nenion interesan faris, pri kio indus ĉiujn informi? Pli kuraĝe sur paĝoj de "A"elmetu viajn novajn ideojn, proponojn kaj s.
Ankaŭ planante la kluban laboron atentu la decidojn de ĉiujara Konferenco, kiu fiksas la plej ĉefajn direktojn por la koncerna agadjaro.
Nepre necesas aktiva kunlaboro kun la fakoj, kiuj bezonegas helpon.
Organizon de E-renkontiĝoj monopoligis kelkaj kluboj. Por aliaj ne restas taŭga tempo kaj okazo. Unuj nur organizas, la aliaj nur veturas. Ĉu tio estas bona?
Mi havas ankoraŭ kelkajn reformajn proponojn, sed pri tio dum la Konferenco.

P.Jegorovas, v/p de SEJM pri sekretariaj aferoj.

---

Redaktis V.Ebel.

Redakcio: 656099 BARNAUL-99,
abon.k. II, "A".